LSG FORUMO nr-o 150 (1-2015)

Membrogazeto de Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj


*Ni celebru la aperon de 150a FORUMO en tiuj malfacilaj tempoj*

## OKAZE DE LA 150A – SALUTON DE RANDY

Estas bona koincido, ke FORUMO 150 aperas ĉe la 100a UK en Lille. Se vi ĉeestos, partoprenu niajn kunvenojn kaj la amikeman etoson. Tie ni (kiel antaŭe) montros la tri celojn de nia ligo: internacia solidareco inter la membraro, diskutado pri Esperanto en GLAT (Gej-Lesb-Ambaŭseksem-Transseks-a) medio, kaj diskuto pri GLAT-aferoj en Esperantio. Ni bezonas helpon por atingi tiujn tri celojn mondskale. Sendu al ni viajn pensojn: pri LSG, pri via lando / regiono, pri projektoj interesaj, kaj pri la estonteco. Se vi estas en Lille, partoprenu gravan disktuton pri tio. Se jvi ne ĉeestas, vi tamen povas sendi vian pensojn al ni. Facilas plendi pro manko de FORUMO aŭ de fizika aktiveco, sed pli malfacilas ŝangi la aferon. La ligo estas ĝiaj membroj. Se ĝi velkas estas pro la membroj kaj se ĝi floros estos pro la membroj. Antaŭen!

*Randy*

**KOLOFONO:**

FORUMO estas informilo por membroj de LSG, la Ligo de Samseksamaj Geesperantistoj

Interrete:http://lsg-esperanto.org

Membriĝo: ĉe la sekretario

kotizoj: 12 € por 1 jaro
30 € por 3 jaroj
300 € por dumviva membreco

Prezidanto: Randy DEAN
[laprezidanto@gmx.net]

Sekretario kaj kasisto:
Rolf KÖHLER, Germanio
Bergstr. 78, DE-01069 Dresden
[lasekretario@gmx.net]
[lakasisto@gmx.net]

Redaktanto de tiu numero:
Wolfgang KIRSCHSTEIN
[laredaktanto@gmx.net]

Estraranoj:
Harry BARRON
[phsb@orange.net]

Francis SOGHOMONIAN
[fsoghomonian@yahoo.fr]

Ed WILLIGER
[trio@tio.net]

Sendu abunde kontribuojn por via membrogazeto FORUMO jam post la kongreso al: [laredaktanto@gmx.net] aŭ al la helikpoŝta adreso de la sekretario.

*Nepre ne kontaktu la personon sur la etikedo de la koverto. La persono ne estas ligano. Nur pro la favoraj poŝt-tarifoj ni forsendas la gazeton el Ĉeĥio*

# TAGORDO POR LA ĜENERALKUNVENO DE LSG DUM 100-A UK EN LILLE

## 27-A DE JULIO 2015 EKDE 10.15-A HORO EN SALONO GRZEBOWSKI

1. Elekti protokoliston
2. Akcepti aŭ ŝanĝi la tagordon
3. Trovi raportistojn por Kongresa Kuriero
4. Trakti la protokolon de la antaŭa ĝenerala kunveno
5. Trakti raporton kaj spezojn de julio 2013 ĝis junio 2015
6. Decidi la financan estontecon kaj la jarkotizon
7. Diskuti la agadojn de LSG kaj ĝian estontecon
8. Elekti prezidanton, kasiston, sekretarion, retprizorganton kaj estraranon por varbado
9. Diskuti la bultenon kaj ties redaktonto(j)n
10. Debati eventualajn rezoluciojn
11. Eventualaj aliaj aferoj
12. Decidi pri dato kaj loko de venonta ĝenerala kunveno
13. Omaĝo al Gilbert Grignaschi kaj aliaj forpasintaj LSG-anoj
14. Fermi la kunvenon.

*La estraro*

**Aldonaĵo: FORUMO n-ro 1**

Ĉar vi hodiaŭ nun havas la 150-a FORUMO en viaj manoj ni pensas, ke estas bona ideo, aldoni denove FORUMO numero 1 de la marto el la jaro 1978. Legu tion el nia kelo kaj amuziĝu!

# SEN VI LSG ESTAS NENIO

## SEKRETARIO KAJ KASISTO NE DENOVE KANDIDATIGOS

Peter Danning fondis LSG en 1977, do antaŭ preskaŭ 40 jaroj. Li estis ĝia sekretario ĝis sia demisio pro malsano post ĉirkaŭ 15 jaroj. Li faris el rondo de kelkaj unuopuloj fortan fakgrupon ene de UEA. Poste sekvis kelkaj sufiĉe kaosaj jaroj por la ligo. Jam fine de la naŭdekaj jaroj LSG staris antaŭ la disrompiĝo.
En tiu aĉa situacio antaŭ pli ol 15 jaroj mi transprenis la respondecon por LSG kiel sekretario kaj kasisto. Mi estas membro de LSG ekde 1981.
La ligo poste denove stabiliĝis kaj sane kreskis. La membraro ĉiam denove reelektis min, komune kun diversaj prezidantoj kiel Arnold, Francis kaj Randy kaj kun kelkaj FORUMO-redaktantoj kiel Wolfgang, Andreas, Maŭro kaj Juanĵo, kaj Thomas / Bernvardo. Mi krome spertis multajn estraranojn diverskvalite. Mi zorgis pri la membroadministrado kaj la mono de la ligo, skribis denove kaj denove petleterojn al la membroj por rememorigi niajn anojn pri la membrokotizo, ktp. ktp. Tio vere estis sufiĉe peza laboro! Krome mi presis la lastajn 37 numerojn de nia membro-gazeto FORUMO kaj dissendis ilin el la proksima Ĉeĥio al la legantoj. Ofte mi finredaktis ĝin ankaŭ kaj unu aŭ du numerojn mi eĉ mem faris pro manko de redaktanto. La laboro kun la "Listo de gastigantoj" kaj la "Koresponda adresaro" mi nur mencias. Mi ne plendas, tio ja estas la laboro de sekretario kaj de kasisto.
Intertempe la mondo tre ŝanĝiĝis. Venis la interreto. Nun ekzistas ne nur nia Yahoo-grupo "Amikaro de LSG", sed ankaŭ grupoj de gejaj esperantistoj en “Ipernity", en "Facebook", en “Google Plus” kaj eble ankoraŭ aliaj. Pli kaj pli da gejunuloj lernas la lingvon en interreto kaj ili ne nur komunikas, sed preskaŭ ekzistas nur virtuale. Oni donas mallongan komen-ton en la reto, kiu estas forgesita postmorgaŭ anstataŭ skribi leteron aŭ artikolon. Tiuj novaj geesperantistoj bedaŭrinde ne plu vidas la neceson membriĝi kaj kunlabori en ligo en la reala mondo. Tion multaj grupoj ne nur en Esperantujo dolore sentas.
Kiel do aspektos nia futuro? Laŭ mi FORUMO estas la apogilo de nia ligo. Ekde jaroj ni serĉas taŭgan laboreman redaktanton, sed ne trovas lin. Wolfgang, redaktanto dum jardekoj, plendas, ke li ricevas nenian reagon de la legantaro, nek ian materialon de la membraro. Tio daŭre malkontentigas kompreneble. Kvankam en ĉiu jar-kunveno kelkaj ĉeestantoj entuziasme promesas kunlaboron – tuj aŭ kelkaj semajnoj post la kunveno ĉio estas forgesata. Tion mi nun spertas ekde jardekoj!

Ekzemple la ĉefa tasko de la prezidanto estas i. a. reprezenti la ligon al UEA kaj la ekstera mondo kaj la serĉado kaj flegado de kontaktoj kun aliaj gejaj organizaĵoj kiel ILGA ktp. Krome nia nuna prezidanto estas la prizorganto de nia retpaĝo. En ĉiuj kampoj li fiaskis. Rilatoj de LSG al iaj organizaĵoj tute ne ekzistas. En nia retpaĝo mankas pluraj FORUMOJ, kvankam mi plurfoje sendis ilin al Randy kaj petis lin komenci sian laboron. Kiel redaktanto oni tie legas nomon de persono, kiu neniam estis redaktanto. Por entuziasmaj ĉeestoj dum UK kaj salutvortoj en Forumo ni ne bezonas prezidanton, kiu ne subtenis la agad-eman sekretarion, sed eĉ agis kontraŭ mi. Mi eble ne plu reelektos lin.

La landaj perantoj Arnold en Usono, Francis en Francio kaj Gefĉo en Britio laboras. Dankon al ili! De la aliaj estraranoj, krom nia provizora redaktanto Wolfgang, mi aŭdis nenion ekde la lasta kunveno antaŭ du jarojn.

Por la futuro de nia ligo mi vidas tri eblecojn, pri kiuj ni voĉdonu en Lille

1. Ni trovas komplete NOVAN estraron, kiu ne nur diras, ke ili laboros, sed komencos kaj majstras ankaŭ la laboron. Kun miaj pli ol 30-jaraj LSG-spertoj mi ne kredas, ke tio sukcesos.
2. Ni ne trovas taŭgan novan estraron, kaj la ligo ekzistas en komato, "nur sur papero". Tio kostus al ni ĉirkaŭ 100 eŭrojn jare por UEA kaj nia retpaĝo kaj povus daŭri kelkajn jarojn. Eble ja falos post kelkaj jaroj anĝelo el la ĉielo?
3. Ni fermas la ligon. Du trionoj de la ĉeestantaj liganoj en Lillo povas tion decidi. Tio signifus, ke nur la gejaj Esperanto-grupoj en la reto pluekzistus. LSG ne plu aperus en la UEA-jarlibro. Ne plu ekzistus oficiala gejlesba fakgrupo en Esperantujo.

Jam nun pripensu, kiel vi volas voĉdoni en Lillo! Tial mi jam nun publikigas la aktualan staton de LSG.

Dum la 100-a UK en Lillo kaj post FORUMO n-ro 150 mi ne plu kandidatos por estraro de LSG. Tiu decido estas definitiva. Mi elkore dankas al ĉiuj, kiuj konfidis al mi kaj subtenis mian laboron por nia ligo en la lastaj 15 jaroj! Estis vere honoro por mi!

*Rolf*

## RESPONDO DE RANDY:
### ESTONTECO

Mi dankas Rolf pro multe da laboro por (kaj pro) LSG. Mi nur membriĝas en LSG pro li. Mi pensas, ke li volas la plej bonan por la ligo. Same mi dankas al Wolfgang pro lia redaktado. Li alfrontis plenumado de ofte plejparte blanka papero.

Mi akceptis (iom rezigne) la presidantecon de LSG pro tio ke neniu alia akceptis tiun laboron. Mi indikis, ke mi intencis esti kontakto por LSG, tiel ke estu almenaŭ vizaĝo por la Ligo - kaj tion mi ja faris.

Eksteraj rilatoj ne estas mia devo. Tamen, LSG estis honorita plurfoje de la podio en Rejkjaviko pro ĝia rilato al la ekstera mondo. Eĉ estis artikolo pri LSG kaj Esperanto en la plej granda angla ĵurnalo de Islando.

Komence mi indikis, ke la plej grava afero por LSG estis konstanta FORUMO. En tiu lasta kampo mi ne havis sukceson. Mi petegis homojn (kiel antaŭ mi faris Francis) aktivi, redakti, kontribui. Sed oni ne povas devigi homojn al voluntulado.
Ni alfrontas krizon de apatio. Ne estas sufiĉe da aktivuloj. Pro tio, tiuj, kiuj aktivas, tro streĉiĝas. Estas eventualaj voluntuloj kiuj aŭ volas nur kunlabori aŭ volas provi ion novan. Ĝis nun ni ĝenerale ne bone traktas ilin. Ili aŭ estas denunciataj pro tio ke ili ne faris grandan laboron aŭ iliaj sugestoj estis tute rifuzitaj.
Estas ja longa tempo ekde mia pasinta mesaĝo (almenaŭ papere). Multaj plendas, ke ne aperis FORUMO dum jaro, neniu el tiuj sendis ion por ĝi. Fakte ne estis sufiĉe da kontribuoj. Mi mem verketis kelkajn aferojn por ĝi, kaj afiŝas en "Google Plus" almenaŭ monate. Kelkaj el vi afiŝas en la Geja kaj Lesba paĝo de Facebook. Ĉu ni fariĝas virtuala ligo? Multaj diras, ke ili ne volas tion, sed se oni opinias tiel, oni devas multe aktivi por daŭra fizika Forumo kaj vigla ligo.
Kion ni faru? Espereble nova vento aperos en Lillo. Esperante!

Randy

SEN VI
LSG
ESTAS NENIO

## LSG FUNEBRAS



*Honore al la memoro de nia multjara membro Gilbert*

Gilbert Grignaschi mortis la 9-an de decmbro 2014 en Parizo post longa malsano en la malsanulejo, kie li restadis. Li estis dum pli ol 30 jaroj membro de LSG, dum pluraj jaroj kiel estrarano. Gilbert estis tre bonkora kaj malferma persono. Li atingis 68 jarojn. Profesie Gilbert estis instruisto kaj iama fakdelegito pri rozkrucismo kaj spiritismo.
LSG funebras kun sia edzo, kun kiu li kunestis dum pli ol 40 jarojn, kaj la familio.
Dum la funebra ceremonio LSG ĉeestis kaj metis florbukedon.

*Rolf*

## LSG-programo dum la 100a UK en Lille

| DATO | HORO | LOKO | TEMO | DETALOJ |
|---|---|---|---|---|
| Sab 25an | 19a horo | Kongresejo<br><br>(Lille Grand Palais) | Movada Foiro | informa stando por la kongresanoj |
| | 23a horo | Le Tchouka<br><br>(80 rue Barthélémy Delespaul) | diskoteko | ĝis la 7a horo |
| Dim 26an | 21a horo | Radio Campus<br><br>(106,6 FM) | radioelsendo | ĉiudimanĉe de la 21a ĝis la 22a horo |
| Lun 27an | 10a horo | Kongresejo<br><br>(Lille Grand Palais) | jarkunsido de LSG | Salono Grzebowki<br><br>(vidu kongreslibron) |
| | 19a horo | domo de asocioj<br><br>(74 rue Royale) | renkontiĝo kun lokaj GLAT-asocioj | - Le Refuge<br><br>- J'en suis j'y reste |
| | 21a horo | drinkejo "Le privilège"<br><br>(2 rue Royale) | kundrinkado | aparta salono en la duona subteretaĝo |
| Mar 28an | 22a horo | Le CUBE<br><br>(5 ter rue du Vieux Faubourg) | spektado de<br><br>filmoj | ĝis noktomezo |
| Mer 29an | 22a horo | saŭnejo „Les Bains" | saŭnado | tuj post la koncertoj (okazas proksime) |
| Ĵaŭ 30an | 18a - 22a30 | asocio<br><br>"J'en suis j'y reste"<br><br>(19 rue de Condé) | akceptado en la loka GLATejo | kundrinka ĉiusemajna renkontiĝo |
| Ven 31an | noktomezo | Le Private<br><br>(79 rue d'Angleterre) | diskoteko | ĝis la 7a horo |

## Vizitindaj lokoj en Lille

| CELO | NOMO | ADRESO | OFERTO / KOMENTO |
|---|---|---|---|
| asocioj | J'en suis j'y reste | 19 rue de Condé | tegmenta GLAT-asocio |
| | Les flamands roses | 19 rue de Condé | ĉiudimanĉa elsendo ĉe Radio Campus (106,6 FM) de la 21a ĝis la 22a horo |
| | Le Refuge | 10 rue Frédéric Mottez | rezervado de salono (27/07) |
| drinkejoj | Le Privilège | 2 rue Royale | konfirmota |
| | Vice Versa | 3 rue de la Barre | konfirmota |
| | Manhattan café | 30 rue Saint Sébastien | konfirmota |
| | Le Bar Town | 10 rue Saint Sébastien | koktelo kun rabato |
| restoracioj | La Boîte à Gand | 80 rue de Gand | |
| | L'estaminet de la Royale | 37 rue Royale | |
| | Au diable des plaisirs | 4 place Lebon | |
| | L'assiette anglaise | 2 rue du Vieux Faubourg | |
| kabaredo | La Bonbonnière | 157 rue Molinel | konfirmota |
| saŭnejoj | Sauna Soho | 10 rue de la Madeleine | ĉefe junuloj,<br>vasta kaj moderna |
| | Les Bains | 52 rue de Cambrai | proksime de la kongresejo, sunbana teraso |
| seksumaj kluboj | Le Sling | 32 rue Jean Jaurès | en eksa fabriko, pluretaĝa,<br>fermita marde |
| | Le Cube | 5 ter rue du Vieux Faubourg | seksvendejo kun 6 000 filmoj,<br>proksima de la stacidomo |

| | | | |
|---|---|---|---|
| dancaj kluboj | Le Tchouka Club | 80 rue Barthélémy Delespaul | |
| | What else @ Le Private | 79 rue d'Angleterre | GLAT nur vendrede |
| | S Club | 28 rue De Wazemmes | |

Kompilita de Didier. Mapo kun indiko de la lokoj estos havebla post via alveno.

.





*Loka homofobo priŝmiris la kison en la fenestro de geja drinkejo.*

**LSG BEZONAS VIN!**

## LETERKESTO

En FORUMO nr-o 149 „Geja homarano“ respondis al mia kvarpaĝa kontribuo en FORUMO n-ro 148 (paĝoj 7 ĝis 10): SAMSEKSAJ PAROJ ANTAŬ LA ALTARO. Estis fundamenta artikolo, kiun mi verkis kiel pastro kaj LSG-ano pri la problemo, kompreneble favore al samseksa kunedziĝo. Jam en FORUMO nr-o 147 nia redaktanto W. verkis sur la paĝoj 1 kaj 2 pri SAMSEKSAJ PAROJ ANTAŬ LA ALTARO – EMBARASO EN KRISTANAJ EKLEZIOJ, kio instigis min detale pritrakti la tutan aferon. Sekve mi ricevis perpoŝte du longajn leterojn personecajn kaj entuziasmajn.
Nun responde al la letero de "Geja homarano" en FORUMO nr-o 149 (paĝoj 11/12): En mia kontribuo SAMSEKSAJ PAROJ ANTAŬ LA ALTARO mi tute ne priskribis “la modernan katolikan eklezion kiel falsajn fratojn, fariseajn pastrojn" – falsa citaĵo! Mi nur skribis, ke malgranda "Eklezio de Norvegio, kiu funkcias ... ankaŭ en Germanio, Pollando kaj Kanado [intertempe ankaŭ en Hungario kaj Usono] forte kontraŭas

samseksamon kaj benadon de vivopartnereco – sed mi konas 4 el iliaj germanaj reprezentantoj, kiuj mem estas gejoj – [do] falsaj fratoj, fariseaj pastroj!" Intertempe unu el ili mortis kaj alia forlasis tiun komunumon – "brave" mi diras (pri la lasta).



Nia amiko "Geja homarano" plue proponas alian (novan) uzadon de la termino "farisea", proponante ke ĝi signifu < "intelekta", "justa" aŭ "demokrata", anstataŭ "hipokrita">. Sed tiun proponon mi bedaŭrinde ne povas sekvi, ĉar en deko da lingvoj, kiujn mi konas, en grandaj kaj seriozaj vortaroj ankaŭ en Esperanto troviĝas por "fariseo" nur la jena uzado: fariseoj kiel socia grupo aŭ fariseismo kiel doktrino kaj vivmaniero de la anoj de tiu socia tavolo, kaj – en transigita signifo – fariseo kiel orgojla, aroganta kaj memjusta hipokritulo, farisea = hipokrita, fariseeco = hipokriteco, fariseismo = memjusteco, hipokritado, hipokriteco ktp.

Kiel ajn: Vivu ĉiu laŭ sia plaĉo, lasu ĉiu vivi ĉiujn aliajn laŭ ilia plaĉo. Vivu ĉiu laŭnature, fizike kaj spirite, libere, verece. Vivu nia Ligo, vivu FORUMO. Vivu la amo!

*LSG-ano 200, Huberto*

# TRA LA MONDO

## Ukrainio : kolizioj kaj arestadoj dum Geja Fiero en Kievo

La "marŝado por egaleco" dum kiu partoprenis aktivuloj por gejaj rajtoj okazis sub forta polica protektado komence de junio. Pro sekurecaj kialoj, la aktivuloj decidis kolektiĝi en loko sufiĉe malproksima de la urbocentro, kaj diskonigi ĝin sufiĉe malfrue al partoprenantoj kaj ĵurnalistoj

Jam antaŭ la komenciĝo de la manifestacio, dudeko da ultranaciismaj aktivuloj kolektiĝis tute proksime. Ili rapide atakis la policon, post kiam dekkvin de ili estis arestitaj.



*Putino, la homofoba rusia prezidento lastatempe lanĉis flagon por malgeja fiero. Jen li ludas kun knabo.*

La "marŝado por egaleco" por subteni la rajtojn de la GLAT-anoj tamen pluiĝis kaj daŭris dekon da minutoj. La

aktivuloj svingis ĉielarkajn flagojn kaj afiŝtabulojn. Unu el ili proklamis : "Mi rajtas esti ĉi tie".

*Samseksemo ege stigmatizata*

Homofobio estas tre disvastigata en Ukrainio. Punata de la leĝo dum la tempo de Soveta Unio, samseksemo estas plu stigmatizata en lando kie la Ortodoksa Eklezio havas fortan influon.

La unua Geja Fiero en la historio de sendependa Ukrainio historio okazis en 2013. Tiam partoprenis preskaŭ cent personojn en Kievo. En 2014, la "marŝado por egaleco" estis nuligita, ĉar la polico ne povis garantii la sekurecon.

*Surbaze de afiŝo de "Neniam milito inter ni" em Facebook*

## Egala edz(in)iĝo en Usono




La 26an de julio la usona plej alta kortumo aljuĝis, ke laŭ la konstitucio, ŝtatoj ne rajtas malegale trakti geedziĝon kaj samseksan edz(in)iĝon. Pro tio, nun ĉiuj ŝtatoj leĝigas kaj akceptas eglajn edz(in)iĝojn. Pro tio ke la decido estis la tagon antaŭ la tradicia semajnfino por festi Christopher-Street-Tagon, estis paradoj (eĉ pli buntaj ol kutime) kaj en lokoj kiuj tiam ne havis fierecan festivalon. Usono estas nun la plej granda (laŭ enloĝantaro) lando kun egalaj rajtoj al edz(in)iĝo. Jam nun aktivuloj en Tajvano, Nord-Irlando, kaj Aŭstralio uzas la ekzemplon de Usono antaŭenigi siajn proponojn por egaleco.

*Randy Dean*



### Eble ankaŭ labor-rajtoj en Usono:

La EOC (egal-oportuna komisio) de la usona federacia registaro decidis, ke diskriminacio en dungado kaj maldungado pro seksemo estas formo de seksa diskriminacio (kiu jam kontraŭ-leĝas). Ili simile decidis lastjare, ke diskriminacio kontraŭ trans-seksuloj estas formo de seksa diskri-minacio. Ekde nun labor-rajtoj por GLAT-homoj estis ŝtata afero. Nur 31 el 50 ŝtatoj kontraŭleĝigis laboran diskriminacion pro seksemo.

*Randy Dean*

# NIA HISTORIO

Viktimo (brita filmo de 1961)

Ni estas en konstruejo. Aŭto de la polico alvenas. Viro forkuras kaj hastas al publika telefono. Li instigas la

alvokiton preni pakaĵon el la ŝranko kaj forkuri. Tiu, lia nomo estas Barrett apenaŭ eskapas de la polico.
Barrett alvokas iun en oficejo de la urbestro, sed tiu minacas sendi la policon. Pluraj alia viroj ne volas paroli kun li. Barrett nepre bezonas monon kaj devas forlasi la landon, sed antaŭ ol tio povas okazi, la polico jam kaptas lin. Barrett volas neniigi la tekon, kion li prenis el la ŝranko, sed ne sukcesas. La tekos enhavas dosieron pri advokato Farr. Barrett ne volas malkaŝi, kial li konservis tiun dosieron, La polico demandas la advolkaton kaj tiu volas paroli kun Barrett, sed tiu jam pendumis sin.




*En Viktimo ĉantaĝistoj klopodas neniigi la vivon de reputaciaj membro de la socio*

Barrett estis viktimo de ĉantaĝistoj kaj nun Farr esploras la aferon, minancante sian propran karieron.
Tiu filmo verŝajne serioze kontribuis al la forigis la krimigon de samseksumadon el la leĝo. Tio okazis finfine en 1967.
Kiam ĝi aperis, la filmo fariĝis skandalo pro la traktado de samseksemo, eĉ se tio okazis en nesensacia maniero. La cenzuro tiutempe same plendis pri tro pozitiva prezento de samseksamo.
Ŝajne nuntempe ni progresis, sed la plena akcepro de samseksamo ankoraŭ estas afero de fora estonteco.

*W*

## ADIAŬO AL PROVIZORAĴO

Kutime estas ĝojiga afero, veni de provizora al definitive stato. Tial mi ĝoje anoncas, ke mi nun definitive ne plu estas je dispono kiel provizora redakanto.
Kiam mi kontraŭvole transprenis denove tiun taskon en 2011, ni interkonsentis pri redakcia teamo, sed tiu jam disfalis dum la kongreso. Ĉiuj estis treege okupita per tiuj kaj jenaj aferoj. Cetere ankaŭ mi havas sufiĉe por pluraj vivoj kaj plentempa laboro. Neniam mi pretis esti sola kontribuanto.
Ankaŭ la ĉaso de kunlaborantoj fiaskis. Jen kaj jen mi petis rekte kaj vane. Jen kaj jen aperis alvokoj de la prezidanto, ĉiam profunda silento estis la reago.
Por tiu 150a numero mi volis skribi skizon de la historio de nia ligo. Neniu pretis al intervjueto. Do la memoroj perdiĝos kiel sablo en la vento. La reto estas perifera fenomeno kaj certe neniam anstataŭigas fortan organizaĵon. Pro la stato de la Ligo respondecas ĉiuj; vigla membraro instigos la estraron. Vi, jes vi kaj ne iu alia povas okazigi la Miraklon de Lille.
La sorto de FORUMO 151 dependas de vi. Nur vi povas vigligi kaj okazigi ĝin. Nur vi povas subteni la novan redaktonton.

*W*



.

